# *Miguel Díaz-Canel pledas por evoluigi la malpezan industrion.*



Havano, 26 jan (RHK) La prezidento Miguel Díaz-Canel, efektivigis laborkunsidon kun la gvidantoj de la ministerio pri la malpeza industrio por kontroli la evoluon de tiu ?i industrio kaj ties rolo en la ekonomio.

Dum la laborkunsido lin akompanis la unua vicprezidento Salvador Valdés kaj la vicprezidento Ramiro Valdés, respektive.

Díaz-Canel pledis por ke tiu ?i industrio fortigu sian oferton per produktoj kvalitaj kiuj kontentigu la bezonojn de la civitanaro.

La informo estis diskonigita per la socia reto Twitter ?e la oficiala konto de la prezidanteco de la respubliko.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/182003-miguel-diaz-canel-pledas-por-evoluigi-la-malpezan-industrion

# Radio Habana Cuba